

Literatura Mondo, 2-a parto: Enhavo, legantaro, alvokoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 628, 1975.10.22 & 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la aŭtunaj monatoj ni trafolumos kun vi la epokfaran revuon ***Literatura Mondo***.

A.- Kiam la financaj malfacilaĵoj ne estis tro tiklaj, ***Literatura Mondo*** estis 24-paĝa monata organo, kies titol-paĝo ĉiufoje ŝanĝiĝis. Bildoj ne ĉiam en rilato kun la tekstoj reliefigis la belecon de la prezento. Sed kio plej multe karakterizis tiun ĉi revuon, tio estas la varieco de la enhavo: noveloj, romanoj eĉ, poemoj, fabelo, rakontoj, teatraĵoj, kantoj, rubrikoj bibliografiaj, biografiaj kaj recenzaj, disputoj, ktp. invitis al legado kaj verkado. Tre ofte la longaj tekstoj aperas felietone, kaj preskaŭ samtempe libroforme.

Cl.- La verkemo de la esperantistaro estis vipita, kaj en kelkaj jaroj nia literaturo atingis dimension nepenseblan antaŭe. Ni tre bedaŭras, ke post la dua mondmilito ne ekzistis grupo da mecenatoj por revivigi la mortintan revuon ***Literatura Mondo***.

A.- La rubriko titolita *Niaj eminentuloj* komencis aperigante portretojn de la plej talentaj esperanto-verkistoj. Tiel la legantoj povis intimiĝi kun la fota portreto de aŭtoroj, kies verkojn ili legis monaton post monato: Edmond Privat, Théophile Cart, Julio Baghy, John Merchant, Ivan Krestanoff, Nikolao Hohlov, Leono Zamenhof, Petro Stojan, M. Solovjev, Kolomano Kalocsay, tiel fariĝis konataj por la legantaro de *Literatura Mondo*.

Cl.- Sed kiu estis tiu legantaro? La du lastaj numeroj de la kvara jaro, januaro kaj februaro 1926 alportas interesajn sciigojn tiurilate.

A.- En artikolo titolita *Ĉi mortis aŭ dormas la konscio de la esperantistaro?* estas anoncate, ke « ***Literatura Mondo*** staras ĉe la rado de la indiferent-abismo, kiu senindulge glutos la solan literaturan organo de nia movado, se tu ĝi ne venas helpo por savi ĝin. [...] »

Cl.- Ni ankoraŭ legas: « ***Literatura Mondo*** devas morti en sia spirita plenforto, se tiu amaso restas surda [...] je nia lasta helpkrio. Tio signifas la mutigon de niaj diverslandaj verkistoj, kaj demonstracion pri la ridinda malforteco de la movado, kiu ne kapablas konservi la vivon de unu sola literatura organo. La nombro de niaj abonantoj neniam superis la 500. El la centmiloj nur kvincent! Vere heroo sinofero, fanatika fido al estonto, neestingebla amo al la lingvo kaj ideo povis teni la plumon en niaj manoj. Nur kvincent troviĝas en la centmiloj, kiuj konscias pri la signifo de la literatura lingvo kaj originala kulturo post 38-jara ekzisto de Esperanto? Ĉu vere nur kvincent? Ni ne volas kredi tion! Ni ne volas perdi la fidon pri la estonto de nia pionira laboro. Lastfoje ni turnas nin kun helpkria petego al la tutmonda Esperantistaro:

A.- Ekzistrajton kaj kompreneman subtenon al ***Literatura Mondo***! »

Cl.- Tiu ĉi helpkrio restis vana. La aprila numero, kiu devis malfermi la kvinan jaron en 1926 ne havis posteulojn ĝis oktobro 1931.

A.- Tiam ***Literatura Mondo*** renaskiĝas kun tiuj ĉi salutvortoj:

Cl.- « Jen ni venas ree, 'la knabino ne mortis, nur dormis'. Ni ne volas tro multe paroli pri morto kaj renaskiĝo. Aferoj pasintaj. Nia programo ne ŝanĝiĝis. Ni estas tute senpartiaj, rilate skolojn kaj direktojn, nia sola mezurilo estas la valoro. Evoluigi la literaturan lingvon, perfektigi la literaturan stilon, instigi verkistojn malnovajn, allogi kaj eduki novajn, disvolvi riĉan branĉaron de literaturo originala kaj tradukita : jen nia klopodo. Kaj krome – ni volas amuzi kaj emocii. Solan specon de artikoloj ni volus malhavi en nia dua periodo, tre oftan en la periodo unua, tio estas : la plendojn pri indiferenteco, la helpkriojn por subteno. Kaj ni firme esperas, ke ni malhavos ilin. »

A.- Kiam oni legas la statistikon de la abonantoj de **Literatura Mondo** aperigitan je la fino de la unua periodo, oni komprenas, kial tiu ĉi belaspekta kaj riĉenhava revuo devis almenaŭ provizore morti. Entute en januaro 1926, je la fino de la kvara jaro, **Literatura Mondo** havis 443 abonantojn. En Germanio troviĝis 72, sekvis Hungario kun 43, Britio kun 35, Latvio kun 30, Hispanio kun 28, Pollando kun 25, Bulgario kun 19, Ruslando kun 17, Estlando kun 16, Svislando kun 14, Francio kun 13, Usono kun 12, Japanio kun 11, Finnlando kaj Italio kun po 10, Ĉeĥoslovakio kaj Litovio kun po 9, Aŭstrio kaj Nederlando kun po 8, Aŭstralio kun 6, Svedio kun 4, Argentino, Jugoslavio, Norvegio kaj Persio kun po 3, Hindio kaj Kanado kun po 2, kaj fine Brazilo, Danlando, Kosta-Riko, Kubo, Meksiko, Nov-Zelando, Turkio kaj San Vincento kun po 1.

Cl.- Hodiaŭ plenaj kolektoj de la unua periodo de **Literatura Mondo** estas ege raraj. En Svislando la solaj registritaj ekzistas en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds [CDELI] kaj en Sempach ĉe sinjoro Boffejon.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!